

ESPERANTO

sub la suda kruco

septembro 2021





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 28[3] numero 143 septembro 2021

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.au / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15a de novembro 2021

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2021 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILLO: *Vessel, Hudson Yards, New York City*, 2019.

Foto: Juliana Malta per Unsplash. Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 22.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
Kep Enderby kaj Onklo Tom	05
Kep Enderby – aldona peceto	06
Mi estas feliĉa ĉar mi havas ananason	08
Kelkaj politikaj pensoj	09
Virinoj kaj sporto	10
La piga strepero en mia ĝardeno	11
Tri filozofiaj ŝercoj	13
La forgesita impresionisto: John Russell	14
MC Escher (1898–1972)	18
Eksterlandaj ferioj... en mia domo	21
Aŭstralia/Nov-Zelanda Hibrida Kongreso	22

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

En Aŭstralio la registaro ankoraŭ luktas por limigi la disvastiĝon de la kronviruso, dum en multaj aliaj landoj ĝi jam trairis la popolon aŭ nuntempe furoras aŭ eĉ refuroras. Kia epoko kiam la novaĵo alvenas el ĉiu angulo de la mondo en niajn domojn tuj. Multaj lokoj en mia ŝtato NSK havas limigojn pri eliro el la hejmo. Eĉ en Armidale, mia loĝloko, tio okazas.

Krom epoko de rapida komuniko ankaŭ estas epoko de granda necerteco. Hieraŭ mi skribis la unuan alineon kaj hodiaŭ ĉiuj en la tuta ŝtato estas devigataj resti hejme. Pro tiaj cirkonstancoj la estraro de AEA nuligis la mendon de kongresejo en Sidnejo por Januaro 2022 kaj nun planas virtualan kongreson. Ankoraŭ restas negranda espero ke iuj grupetoj povos kunveni tra la lando por partopreni ĝin kune, anstataŭ ke ĉiu partoprenu individue en ties hejmo. Kompreneble ni atendas partoprenadon de niaj najbaroj el NZ kaj el multaj aliaj landoj. Se vi planas aliĝi, vizitu la retpaĝon de AEA. Kaj se vi deziras, oferti ion por prezenti dum la kongreso kontaktu al AEA.

La monata prelegserio aranĝata de AEA daŭras. La trian dimanĉon de ĉiu

monato vi povas spekti du prelegojn. Se vi maltrafas tiujn, eblas spekti per la jutuba kanalo, "*Esperanto Australia*".

Unu el la eblaj eskapoj dum la pandemiaj limigoj estas sin ekzerci ie en la ĉirkaŭaĵo kaj multaj en mia urbo elektas vagi en parko proksima por observi naturon. Mi supozas ke oni elektas tion en multaj lokoj tra la lando. Plej rimarkinde en Aŭstralio estas la abundo da birdoj en naturo, parkoj kaj eĉ meze de granda urbo kiel Melburno. Por ĉi tiu numero Heather Heldzingen verkis artikolon pri birdoj kiuj vizitis kaj bredis en ŝia ĝardeno. AEA-a prelego venontan monaton estos pri birdoj kaj birdobservado. Tia temo estas alloga por mi kaj verŝajne por aliaj. Pasintan semajnon, antaŭ la limigoj, mi vizitis mian ekslaborejon kaj observis birdeton kiu dancis ĉirkaŭ la trunko de arbo. Post kontrolo mi identigis ĝin kiel *Daphoenositta chrysoptera*, kiu estas neofta en nia regiono. Ĝi similas al la sito el Eŭropo – malgranda birdo kun mallonga vosto kaj pinta beko por elfosi nutraĵon el sub arboŝelo. Ĉiam la naturo povas prezenti al ni surprizon se ni atente observas.



Kep Enderby kaj Onklo Tom

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Keppel Enderby naskiĝis ĉe Dubbo en 1926.

Kep iam rakontis al mi pri sia onklo Tom, kiu loĝis en Wellington NSW. Wellington estas tre proksima al Dubbo. Do mi serĉis plian informon pri li kaj trovis la sekvan per Trove: bit.ly/kep-obit

Thomas Enderby naskiĝis en Wollongong ĉ.1886 sed kiel knabo translokiĝis al Wellington kun sia familio. Kiel 34-jarulo en 1920 li entreprenis fruktovendejon en la urbo kaj daŭre faris tion ĝis sia morto en 1944. Pro la varmega vetero en la somero, Tom ankaŭ vendis fruktoglaciaĵojn freŝe faritajn el diversaj fruktoj kun nuksoj. Je Kristnasko li vendis donacojn taŭgajn kaj dolĉaĵojn hejmfaritajn al la lokanoj. Kiel oni povas imagi, li bone sukcesis kiel vendisto kaj estis bone konata de multaj en la regiono. Li fervore rekomendis la regionon al vizitantoj kaj tiel estis grava subtenanto de la loka ekonomio.

Konata kiel bonhumora, inteligenta homo, kiu vaste legis pri internaciaj aferoj, Tom estis arda membro de la Esperanto-Societo (pri kiu societo la ĵurnala artikolo ne priskribas).

En 1944 li suferis pro apopleksio kaj mortis.

Do ĉu Kep tiel forte subtenis Esperanton pro memoro pri sia onklo Tom? Je la tempo de ties morto, Kep estis 18-jarulo kaj certe pro la proksimeco de Dubbo al Wellington ili havis kontakton oftan. En la rakonto pri Tom, Kep aludis al la helpo kiun Tom povis

fari por la judoj pere de Esperanto dum la dua mondmilito. Pri la detaloj de tia helpo mi ne havas informon kaj eble pro ĝia sekreteco ne restas spuroj.

Kep sciis pri la fakto ke onklo Tom estis Esperantisto kiu subtenis la rajtojn de ĉiuj homoj. Estas kuraĝige scii ke jara prelega serio de la Aŭstralia Komisiono de Homaj Rajtoj estas nomita honore al Kep, iama prezidanto de la EF de NSK, AEA kaj UEA. Vidu la retejon: bit.ly/ke-mls.

Do Kep iĝis ĉampiono de homaj rajtoj kontraŭ diskriminacio, sed ĉu multaj scias ke li ankaŭ estis golfĉampiono? En 1946, 20-jaraĝa Kep gajnis unuvice en la ŝtata golfkonkurso kiel amatoro.



Dum jaroj li tenis la rekordon por la Dubbo golfludejo. Tri sub la normo. Sed kiel li iam rakontis, li devis elekti – ĉu sekvi la vojon de golfprofesiulo aŭ ĉu studi pri juro. En tiu epoko estis malfacile enspezi pere de sporto, eĉ golfo, do li elektis studi, sed dum tiu tempo ankoraŭ trovis iom da tempo por golfludi. Li facile venkis en la universitataj golfturniroj kaj ankoraŭ konkursis ĝis 1952, tiam en la Brita Malferma Golfturniro (British Open). Li iom gajnis en tiu konkurso, sed ne la

premion. Se li tute dediĉintus sin al golfo, kiel profesiuloj hodiaŭ, li certe estus gajninta famon en tiu kampo.

Do, esplorante ĵurnalartikolojn pri Kep per Trove, oni rimarkas, en la periodo 1945–52, artikolojn pri Kep la golfludisto, sed en 1970–78 ili estas pri Kep la politikisto kaj ties laboro por laboristoj, indiĝenoj, ktp – ĝenerale por homaj rajtoj. Do kvankam ni perdis ĉampionon de la golfejo, ni gajnis elstaran ĉampionon por homaj rajtoj.

Kep Enderby – aldona peceto

VERA PAYNE (PERTO)

Dum la somero de 2008 Theresa Kot, prezidanto de la Asocio de Sendependaj Emeritoj, intervjuis Kep kaj verŝajne surpriziĝis pro la juna perspektivo de la tiama 83-jarulo.

Koncerne golfon, li informis ŝin, ke li estis ĉampiono de la Golfa Klubo de Dubbo je la aĝo 14! Studante kaj deĵorante en Londono dum la 50-aj jaroj, en 1951 li partoprenis en la *British Open* (Brita Malferma Golfturniro).

Post akiro de LLM (*Legum Magister*, Magistro de Leĝoj) en 1954, li revenis al Aŭstralio kaj fariĝis Supera Lekciisto ĉe la Aŭstralia Nacia Universitato. Sed pli interesis lin la leĝo, homaj rajtoj, filozofio kaj politiko. Ano de la Laborista Partio, li estis bone konata pro siaj streboj en la tribunaloj, defendante senpage homojn, kiuj manifestaciis kontraŭ la milito en Vjetnamio. Li

fariĝis “*backbencher*” (senpostena parlamentano) ĝis elektiĝis la registaro de Gough Whitlam en 1972, post kiam li estris diversajn Ministeriojn kaj finfine atingis la oficon de Prokuroro.

Post sia politika kariero li revenis al Sidnejo kiel QC (Konsilisto de la Reĝino) ĝis 1982, de kiam li deĵoris en la Supera Kortumo de NSK dum 11 jaroj. Post sia emeritiĝo Kep profitis la liberan tempon per legado, vojaĝado kaj velado en sia olda, klasika jaĥto sur la sidneja haveno. Li ankaŭ aviadis per unu-motora aviadilo kaj per helikoptero.




Dum la periodo kiel juĝisto, Kep ekrlatis kun Ambasadoro Ralph Harry, kiu memorigis lin pri tiu lingvo de Onklo Tom, Esperanto. Kep estis modesta pri sia lingva kompetenteco, skribis Theresa, al kiu li informis, ke dum lia unua UK en Kubo, gastigis lin Fidel Castro, kun kiu li diskutis aŭstraliajn politikojn. Li fariĝis prezidanto de AEA en 1992, kaj de UEA en 1996 post la UK en Adelajdo. Tri jarojn poste, li rezignis pro malsano.

Kep estis fervora ĉampiono de libervola eŭtanazio kaj fariĝis prezidanto

de la NSK-a Societo por Libervola Eŭtanazio dum 2002–08. Li kredis, ke 'la plej fundamenta rajto de ĉiuj estas la rajto fini sian propran vivon'. Je tiu tempo, 2008, li ne atendis baldaŭan sukceson en leĝoj tiurilate. (Li estus tre feliĉa hodiaŭ pro tiuj en Viktorio kaj OA.)

Kep ridetigis Theresa-n per siaj opinioj koncerne alkoholon; li tre ŝatis sian blankan vinon, kaj kvankam post koroperacio lia kuracisto admonis, Ne! Kep faris 'juĝistan decidon' ne tute cedi. Vi mankas al ni, Kep; ripozu en paco.



Mi estas feliĉa ĉar mi havas ananason

JOANNE JOHNS (BRISBANO)

Antaŭ kelkaj semajnoj ni festis la 19-an naskiĝtagon de mia nevino, per festo kun tropika temo kaj sen-alkoholaj kokteloj. Ni ornamis la antaŭan korton, vestiĝis polinezi-stile, kaj ludis muzikon per ukuleloj, kaj ŝtalaj tamburoj.

Parto de la ornamaĵoj estis du freŝaj ananasoj, kaj post la festo ni ricevis unu el tiuj. Mi faris rostitajn sandviĉojn kun ŝinko, fromaĝo kaj ananaso. Mi kuiris frititan rizon kun ananaso. Mi manĝis freŝan ananason. Mi kreis fermentaĵon kun brasiko, legomoj, kareo kaj ananaso. Kaj ankoraŭ restis iom da ananaso! Do finfine mi eluzis la ceteron en klasika kuko de mia infanaĝo – inversigita ananasa kuko. Jen la recepto!

Inversigita Ananasa Kuko

Preparado: 20 minutoj

Kuirado: 40 minutoj

Porcioj: 8

Ingrediencoj

20g ($\frac{3}{4}$ unco) da butero, fandita

2 supkuleroj da mola bruna sukero

440g (14 unca) ladskatolo da ananaso en natura suko (aŭ uzu freŝan ananason!)

90g (3 uncoj) da butero

$\frac{1}{2}$ taso (125g / 4 uncoj) da fajngrajna sukero ("caster sugar" angle)

2 ovoj, iomete miksitaj

1 tekulero da vanila esenco

1 taso (125g / 4 uncoj) da faruno kun bakpulvoro

Metodo

1. Antaŭhejtu la fornon ĝis 180°C (350°F). Grasigu 20 cm (8") ring-forman bakpaton. (Se vi ne havas tian formon, ne gravas – mi uzis cirklan

kaj la kuko estis iom malpli alta sed ankoraŭ bongusta!) Verŝu la fanditan buteron en la bakpaton kaj klinu ĝin por kovri la subon egale. Disŝutu la brunan sukeron super la buteron. Drejnu la ananason, kaj retenu $\frac{1}{3}$ tason (80ml / 2 $\frac{3}{4}$ likvajn uncojn) de la suko. Duonigu la ananasajn pecojn kaj aranĝu super la bruna sukero.

2. Uzante elektran miksilon, miksu la buteron kaj sukeron ĝis malhela kaj krema. Aldonu la ovojn iom post iom, miksante bone post ĉiu aldono. Enmiksi la vanilan esencon.
3. Uzante metalan kuleron, enfaldu iom da faruno, kaj poste iom da suko, kaj ripetu ĝis ĉio estas enmiksita.
4. Verŝu la miksaĵon sur la ananason kaj ebenigu ĝin. Baku dum 35–40 minutoj, aŭ ĝis tranĉilo elvenas pura kiam enmetita en la mezon. Lasu en la bakpato dum 10 minutoj, kaj poste lasu ĝin malvarmetiĝi sur krado.

Ĉi tiu recepto estis prenita de mia plej amata, plej "kovrita-per-faruno" receptolibro: *Cooking, a commonsense guide*, publikigita de Family Circle.



Kelkaj politikaj pensoj

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Estas nuntempe modo paroli malŝate pri Miĥail Gorbaĉov, la lasta ĉefo de Sovetunio. Kiam li kandidatis kiel senpartiuulo en la prezidenta baloto en 1996, li ricevis abisman 0,5 % de la voĉoj.

Veraj diktatoroj nomas lin “malfortulo”, kiu ne uzis ĉiajn rimedojn por resti mem reganta kaj cementi la rolon de la Komunista Partio kiel la eterna decidanto (kontrastu kun la nuna ĉina partiestro).

Aliaj kondamnas lian naivecon pri ekonomiaj aferoj. Lia *perestrojka* (alkonstruado) kondukis al kolapso.

Jes, vere, Gorbaĉov esperis, ke la Komunista Partio restos la gvidanto de soveta politiko – ne per la tradicia subpremado de aliaj opinioj, sed per bona kaj justa gvidado. Li eĉ permesis multpartiajn balotojn en la vasta imperio, kaj ĉie lia partio perdis. Li draste limigis la potencon de la timinda KGB, la sekreta polico.

Kaj la ekonomia kolapso? Li sciis, ke la ĝistiam sistemo estas ne plu savebla. Sed kiel transiri de sistemo, en kiu burokratoj en Moskvo decidas ĉion, al sistemo, kiu permesas pli da libero al lokaj homoj?

Mi estis en Sovetunio en la lasta jaro de ĝia ekzisto. Mi instruis la anglan al junaj homoj, kiuj malkaŝe diris, ke antaŭ kelkaj jaroj (tio estas, antaŭ ol Gorbaĉov transprenis) ili certe ne kuraĝintus paroli libere al mi. Dank’ al Gorbaĉov ili havis veran esprimliberecon.

Gorbaĉov estis deca homo, kiu alfrontis neeblan taskon. Fakte mi nomus lin la *sola* bona homo inter la gvidantoj de Ruslando/ Sovetunio, historie kaj nuntempe. Kaj liaj kelkaj jaroj kiel partiestro estis la sola

periodo de esprimlibereco en la historio de tiu landego.

Kiu alia kapablintus persvadi la ventkapan Ronald Reagan meti finon al la Malvarma Milito?

...

En Usono, la “lando de la liberaj”, milionoj da homoj kondamnas la sansistemon, kiu en iu formo ekzistas en ĉiuj aliaj evoluintaj landoj, kiel “socialisma medicino”. Socialisma medicino? Stalinaj gulagoj kaj sekretaj policistoj kaŝe aŭskultantaj ĉe ĉiu pordo?

Nu, la bildo estas iom alia.

Mi ĵus pasigis kelkajn semajnojn en hospitalo. Ĉiutagaj vizitoj de teamo da kuracistoj. Konstanta atento de kompetentaj kaj helpemaj flegistoj. Operacio. Senfina listo da medikamentoj. Manĝoj. Televidado. Telefonado.

Se tio okazus en Usono, kiom mi devus pagi?

Kaj kiom mi pagis ĉi tie? Neniom.

Kiel tio eblas? Nu, ne estas mistero. Dum jardekoj mi laboris kaj pagis impostojn. Parto de miaj impostoj eniris la kason de Medibank, kaj tio financis la kuracadon kaj flegadon de bezonantaj homoj. Mi neniam bezonis tiutempe, sed mi ne protestis, ĉar iam...

Kaj jes, ŝajnas neeviteble, ke homoj pli ol 80-jaraj bezonas kuracadon, ankaŭ mi. La mono venas el la poŝoj de plijunaj laborantoj, kiuj eble iam mem bezonos helpon.

Eble estas tempo, karaj usonaj amikoj, por forĵeti nepripensatajn sloganojn.

Virinoj kaj sporto

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

La plejparto de la ŝtatoj en la mondo adoptis kiel politikan reĝimon demokration. La devizo – ĉu klare esprimata, kiel en Francujo, kie ĝi videblas sur multaj aĵoj, aŭ ne – estas: libereco, egaleco, frateco. Sed kiu estas celita per tiu egaleco? En antikva Grekujo demokratio koncernis nur la potencajn virojn, ne la virinojn aŭ la sklavojn. La freŝdataj skandaloj pri seksa perforto en la aŭstralia parlamento pensigas pri la libro *Bestofarmo* de George Orwell: kelkaj estas pli egalaj ol la aliaj. En tiu kazo, la viroj rajtas uzi sian virecon kontraŭ virinoj sen tro da risko.

Verŝajne tiuj eventoj instigis Annabel Crabb prezenti, en la televida kanalo ABC, historian serion pri la kondiĉo de virinoj en la federacia parlamento. Ĉu sporto, kies celo ne estas nur provizi bonan sanon, sed ankaŭ instigi al lojaleco kaj frateco, egale traktas virojn kaj virinojn?

Ridigas onin fotoj de la komenco de la 20a jarcento, kiam virinoj devis sportumi en longa robo pro malpermeso montri kio estas inter la kolo kaj la maleoloj. “Pro deco!” oni certe deklarus tiam. Oni demandas sin kiel Charlotte Cooper, la

unua tenisoludantino, kiu gajnis oran medalon en Parizo en 1900, povis kuri en tiuj vestoj.

Male, ĵus antaŭ la ĉijaraj olimpiaj ludoj, la norvegaj teamaninoj de plaĝa handbalo ricevis monpunon de 1500 eŭroj en la ĉampionado en Varna, Bulgarujo, pro surporto de ŝorto anstataŭ bikino, kies flanko ne rajtas esti pli larĝa ol dek centimetroj. Sed la viroj rajtas surhavi pantalonetojn.

La reguloj pri la oficialaj vestoj por virinoj kadre de la olimpiaj ludoj estas kompleksaj kaj varias laŭ la disciplino. Tamen la tendenco estas emfazi la aspekton de virina korpo (multaj fotoj de sportĵurnalistoj estas pruvoj: la postaĵo de viro ne allogas tiom, kiom tiu de virino) anstataŭ provizi veston komfortan fizike kaj morale.

Ne estas sekreto, ke kiam virinoj preferas elekti volejpilkon en sporthalo al volejpilko sur plaĝo, ili fakte elektas vestojn al ili pli taŭgajn ol bikino. Trejniĝi por konkuri je la nivelo de olimpiaj ludoj estas jam sufiĉe postulema. Kial aldoni tiujn ĝenaĵojn anstataŭ lasi la virinojn liberaj elekti siajn preferatajn vestojn?

Ni esperu, ke atletoj kiel Olivia Breen kaj Alice Dearing venkos ne nur en sia fako, sed ankaŭ kontraŭ la trudemaj viraj decidoj rilate vestojn kaj ke viroj finfine ĉesos konsideri virinojn nur kiel seksajn objektojn kaj aprezos ilian forton, energion, persistemon kaj kompetentecon.



Brita tenisisto, Charlotte Cooper

Tri filozofiaj ŝercoj

JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Kiu mi estas? Ĉu ekzistas Dio? Ĉu libera volo estas reala aŭ nur iluzio? Kiel oni scias ion ajn? Demandoj tiaj estas por iuj, tute vanaj, sed, por aliaj, fascinaj. Mi estas ano de la dua grupo. Dum la virtuala kongreso en januaro, mi prezentis prelegon: *Amuza enkonduko al filozofio* (aŭ *Filozofio por la nefilozofo*). En la spirito de ĝi, jen tri ŝercoj, kiuj temas pri identeco, sciado kaj "karmo".



1. Kiam Adamo iĝis sepdek jaraĝa, li decidis tute ŝanĝi sian vivstilon por vivi pli longe. Li komencis striktan dieton, li sportkuris, li naĝis kaj li pasigis pli da tempo en la sunbrilo. Post nur tri monatoj, Adamo perdis dek kvin kilogramojn da pezo, reduktis sian talion per dek kvin centimetroj kaj pligrandigis sian bruston per dek du centimetroj. Svelta kaj bruna, li decidis havi mojosan, novan hararanĝon. Poste, irante el la barbirejo, li estis trafita de buso.

Dum li kuŝis, mortante, Adamo ekkriis: "Dio, kial Vi faris tion al mi?"

Kaj voĉo el la ĉielo respondis, "Verdire, Adamo, mi ne rekonis vin."



2. Kvar medicinistoj iris por ĉasi anasojn: ĝenerala kuracisto, ginekologo, kirurgo kaj patologo. Dum birdo flugis supre, la ĝenerala kuracisto preparis pafi sed haltis, ĉar li ne tute certis, ĉu ĝi estas anaso. La ginekologo ankaŭ preparis sin por pafi, sed mallevis sian pafilon kiam li konstatis, ke li ne sciis, ĉu ĝi estas vir-anaso aŭ anasino. La kirurgo, dume, pafis la birdon morta, turnis sin al la patologo kaj diris, "Iru kaj vidu, ĉu tio estas anaso."



3. Juna pastro estis avida golfludanto. Eĉ dum Sankta Vendredo, la plej sankta tago de la jaro, li ŝteliris sole eksteren, por rapida ludo. Ĉe la lasta truo, li batis la pilkon kaj ekblovo portis ĝin rekte super la truo kaj faligis ĝin por iĝi tuja entruigo. Anĝelo, kiu vidis tiun miraklon, plendis al Dio, "Tiu ulo golfludas dum Sankta Vendredo, kaj pro Vi, li atingis tujan entruigon? Ĉu tio estas puno?"

"Kompreneble," Dio diris, ridetante, "Al kiu li povos fanfaroni?"

La bela kaj inteligenta piga strepero en mia ĝardeno

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Antaŭ unu jaro du streperoj aperis en mia eta ĝardeno en St.Kilda. Ili uzis la birdbanujon kaj kolektis aĵojn por konstrui neston. Kiam mi laboras en la ĝardeno mi ofte aŭskultas muzikon per laŭtigilo. Tio tre interesas la birdojn, kiuj sidis aŭ sur aŭ apud la laŭtigilo por pli bone aŭdi ĝin. Mi decidis oferti iom da nutraĵo al ili, kiun ili unue timeme akceptis. Iom post iom ili kuraĝiĝis kaj kiam mi eniris la ĝardenon ili tuj alvenis pli kaj pli proksime al mi. Finfine ili akceptis nutraĵojn el mia mano.

Post semajnoj mi povis aŭdi la kriaĉon de iliaj idoj, kiuj kriis preskaŭ senhalte dum la tago. Mi plialtigis la kvanton da nutraĵo por la beboj, por helpi al la gepatroj. Unu tagon ne nur estis du streperoj en mia ĝardeno sed kvin. La idoj estis lanugaj sed tiom grandaj kiom la gepatroj kiuj daŭre manĝigis ilin. Post nelonge la gepatraj

birdoj rifuzis doni manĝaĵon al ili, kiuj devis lerni zorgi pri si mem. La gepatroj finfine atakis siajn idojn se tiuj vizitis mian ĝardenon. Post nelonge la idoj malaperis – ankaŭ la gepatraj birdoj forflugis.

Ĉi-monate ili reaperis en mia ĝardeno kun iliaj belaj kantoj. Ili konstruas novan neston kaj mi antaŭĝuas renkonti ilian novan familion.

lom pri la birdo

Ĝi estas piga strepero (*Strepera graculina*), ankaŭ nomita – en la angla – “pied currawong” (karaŭong). La distribuo estas orienta Aŭstralio.

Pigaj streperoj estas nigraj birdoj kun blankaj partoj ĉe la flugiloj, subvostaj kaŝejoj, la vostobazo kaj, plej videble, la vostopinto. Ili havas flavajn okulojn. Plenkreskaj birdoj estas 44–50 cm longaj



kaj la flugiloj estas longaj kaj larĝaj. La longa kaj peza beko estas proksimume unu kaj duono foje pli longa ol la kapo, kaj estas hokita ĉe la fino.

La nomo "*currawong*" devenas de la alvoko de la birdo. Tamen la ĝusta origino de la termino estas neklara. La plej verŝajna fonto estas la vorto "garrawan" el la loka indiĝena lingvo (Jagera) en la brisbana regiono.

Ene de sia teritorio, strepera grupo estas ĝenerale nevagama, kvankam grupoj en pli altaj regionoj translokiĝas al pli malaltaj areoj dum la pli malvarmaj monatoj. Ĝi estas ĉiomanĝa, laŭ dieto, kiu inkluzivas multdiversajn berojn kaj semojn, senvertebrulojn, birdovojn, junajn birdojn kaj junajn marsupiulojn. Ĝi estas predanto, kiu bone adaptiĝas al urboj kaj troveblas en parkoj kaj ĝardenoj kaj ankaŭ en maldensaj arbaroj. La loĝmedio inkluzivas ĉian arbaron, kvankam maturaj arboj estas preferataj por reproduktado. Nestado kaj la plej granda parto de furaĝado okazas en arboj, kontraste kun la grundo-furaĝa konduto de ĝia parenco, la piga gimnorino (Australian Magpie – *Gymnorhina tibicen*).

La ino konstruas la neston kaj kovas la idojn sole, kvankam ambaŭ gepatroj nutras la idojn.

Dum la reprodukta sezono, ili fariĝas teritoriemaj, defendante kaj nestajn kaj manĝajn

areojn. Streperoj vigle forpelas minacantojn kiel korvojn, kaj okupiĝas pri plonĝ-bombado kaj aera ĉasado. Ili adoptas specifajn minacpozojn kontraŭ aliaj streperoj, mallevante la kapon tiel, ke la kapo kaj korpo estas paralelaj al la grundo kaj direktas la bekon antaŭen, ofte rekte al la entrudiĝanto. La virbirdo superregas en minacaj montroj kaj teritoria defendo, kaj gardas la inon dum ŝi konstruas la neston.

Junaj birdoj havas similajn markojn al plenkreskuloj sed la okuloj estas malhelbrunaj kaj la beko malhela kun flava pinto. La faŭko estas brilflava. Pli maljunaj birdoj malheliĝas ĝis plenkreska plumaro alvenas. La piga strepero povas vivi pli ol 20 jarojn en naturo.

Ili estas bruemaj birdoj, vokantaj dumfluge kaj ĉiam dum la tago. Ili estas pli bruemaj frumatene kaj vespere antaŭ ripozado, kaj same tiel antaŭ pluvo.



La forgesita impresionisto: la aŭstralia John Russell

JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Kiam oni pensas pri la esprimo “Aŭstralia impresionisto” oni kutime pensas pri pentristoj kiel Tom Roberts kaj Arthur Streeton. Tamen estis unu aŭstralia pentristo, kiu aparte meritas tiun priskribon: John Russell, kiu vivis de 1858 ĝis 1930.

Art-historiistoj ofte priskribas Russell kiel “la plej impresionisma el la impresionistoj de Aŭstralio”. Tamen, kion tio signifas? Tio estas la temo de ĉi tiu artikolo.



1. John Russell, fotita de Barcroft Capel Boake, Sidnejo, ĉ 1883

Russell naskiĝis en Darlinghurst, Sidnejo, la 16-an de junio 1858. (Por komparo, LL Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859, do Russell estis pli aĝa ol Zamenhof per nur jaro kaj duono.) La riĉa patro de Russell mortis en 1879, kiam Russell estis nur 21-jaraĝa. Tio liberigis Russell de familiaj devigoj kaj igis lin finance sendependa.

Russell forlasis Sidnejon por Londono, 25-jaraĝa, en majo 1883 kaj studis arton ĉe la fama lernejo Slade. Tie studentoj desegnis vivantajn pozistojn, malkiel tiuj ĉe la Reĝa Akademio, kiuj nur desegnis gipsajn kopiojn de klasikaj skulptaĵoj.

Russell havis talenton de facila amikemo. Pro tio li, dum sia vivo, gajnis multajn amikojn, kun kiuj li ofte korespondis.

En frua 1884 Russell vojaĝis al Parizo, spektis ekspozicion de la impresionisto Claude Monet kaj revenis al Londono. Poste en la sama jaro, li revojaĝis al Parizo por loĝi. Li ekloĝis en Montmartre, la koro de la kulturo de kafejoj kaj kabaredoj.

Russell studis ĉe malgranda artlernejo regata de Fernand-Anne Piestre, konata kiel “Cormon”, kiu ankaŭ estis la nomo de la lernejo. Tiu lernejo havis plejparte francajn studentojn, inkluzive de Émile Bernard kaj Henri de Toulouse-Lautrec. Krome, la fama (aŭ nun fi-fama) Bulvarado de Clichy (proksime al la hejmo de Russell) estis la centro de komunumo de artistoj, inkluzive de Degas, Renoir kaj Seurat.

Frue en 1886, nova studento alvenis: socie malgracia nederlandano nomita Vincent van Gogh. Van Gogh estis

33-jaraĝa (Russell, 28). Ili kreis fortan amikecon, kiu restis ĝis la morto de van Gogh en 1890.

Russell trovis la kapon de van Gogh tre interesa (aparte ĉar lia hararo estis tre proksime tondita) kaj li faris serion da krajon-etudoj, nun en la kolekto de la Art-Galerio de NSK (Bildo 2).



2. John Russell, 'Kvin etudoj de Vincent van Gogh' 1886/88

Russell ankaŭ pentris portreton de van Gogh per olefarboj kaj donis ĝin al van Gogh, kiu estimegis ĝin (Bildo 3). La pentraĵo nun estas en la kolekto de la Muzeo Van Gogh en Amsterdamo. Rimarku la realismon de helaĵoj kaj malhelaĵoj, kaj la liberan traktadon de farbo, aparte en la manoj.

Ekzistis kelkaj malsamecoj inter la du artistoj. Ekzemple, van Gogh finance dependis de sia frato, Theo, dum Russell estis sendepende riĉa. Krome, van Gogh estis socie malgracia, dum Russell estis bone ŝatata kaj societema (ankaŭ fizike forta: li estis konata kiel bona remanto kaj boksanto). Tamen la nederlandano havis profundan konvinkon pri sia arto; pri tio Russell estis impresita kaj fascinita (malkiel aliaj studentoj, laŭ kiuj, van Gogh estis tro severa).



3. John Russell, 'Vincent van Gogh 1886

...

La jaro 1886 estis pivota, kaj por Russell, kaj por avangarda arto en Francio. Okazis kvar gravaj ekspozicioj en Parizo – inkluzive de la unua publika montrado de punktismo (*"pointillisme"*) de Seurat, Signac kaj Pissarro.

La antaŭan jaron Russell komencis rilaton kun italino kaj pozistino por la fama franca skulptisto, Auguste Rodin, Anna Maria Antionetta Mattiocco (konata kiel "Marianna"). Russell ofte desegnis kaj pentris ŝin. En 1886 Russell kaj Marianna vojaĝis al Bretonio, ĉe la okcidenta marbordo de Francio.

Jam ekzistis kelkaj kolonioj de artistoj en Bretonio, tamen Russell kaj Marianna aniĝis al neniuj. Anstataŭe, ili iris al la proksima insulo, Belle-Île (aŭ "Belle-Île-en-Mer" – laŭvorte, "Bela Insulo en la Maro"), en la Golfo de Biskajo. Ili ekloĝis en Port Goulphar, ŝirmita golfeto ĉe la tempesta okcidenta bordo.



4. John Russell, 'Sino Sisley apud la bordo de la rivero Loing ĉe Moret' 1887

Russell kutime pentris pejzaĝojn subĉiele ("en plein air"). Tiu praktiko estas signifa kaj grava, ĉar ĝi instigas pli da improvizado kaj spontaneeco.

Post kvar monatoj, la fama artisto Claude Monet alvenis al Belle-Île, en la apuda vilaĝo de Kervilahouen. (Laŭ Russell, Monet estis "la princo de la impresionistoj".) Unu tagon Russell aliris al Monet. Monet kutime malinstigis junajn flatantajn pentristojn pri konsilpetado, tamen li feliĉe akceptis Russell – eble ĉar Russell havis sian propran kuirstinon!*

Monet permesis al Russell observi lin ekstere sur la pintoj de la klifoj kaj antaŭ la tempestaj maroj, kiuj karakterizas ĉi tiun marbordon. Kvankam li jam estis sperta subĉiela pentristo, Russell poste komencis eksperimenti pri pli

malstreĉa impresionisma stilo, uzante diversajn penikojn, registrante lumajn kaj atmosferajn efikojn, figurante ĉiutagan vivon kaj naturajn pejzaĝojn, kaj briligante sian paleton dum li eksperimentis kun pli puraj koloroj. Russell tute forlasis tonan modladon kaj limigitan koloradon. Monet kaj Russell pasis du plenajn semajnojn, kune pentrante kaj manĝante.

Russell reiris al Parizo, tamen post kiam li kaj Marianna geedziĝis en 1888, ili reiris al Belle-Île por loĝi. Ili konstruis grandan domon (laŭ dezajno de Russell mem), kiun ili nomis "Château de Goulphar". En februaro 1888, la bona amiko de Russell, Vincent van Gogh, forlasis Parizon por la urbeto Arles en suda Francio (proksima al Marsejlo). Russell invitis van Gogh restadi kun li en Belle-Île kiam ajn li deziras,



5. John Russell, 'La Pingloj de Belle-Île' ĉ. 1890

tamen tio neniam okazis. Kvankam ili korespondadis, kaj van Gogh sendis al Russell 12 skribil-inkajn desegnaĵojn, ili neniam denove renkontiĝis.

Post la morto de Vincent van Gogh, Russell skribis al Theo, la amata frato de Vincent: "Li estis bona amiko al mi. Mi antaŭĝojis vidi lin plene resanigita... Li havis raran kvaliton neniam forgesi amikon... Via frato estis ege originala en sia verko. Bedaŭrinde li estis forprenita de ni ĵus kiam li eksentis sian povon."

Nun, ni zorgeme esploru du pentraĵojn de Russell. La unua estas *S-ino Sisley apud la bordo de la rivero Loing ĉe Moret* (bildo 4). Vidu kiel Russell permesis la subfarbitan tolon tramontiĝi (ekzemple ĉe la meza arbtrunko). Rimarku la dorsan vidon kaj nekutiman tondadon de la korpo, kaj ankaŭ la nesimetrian komponadon, kiuj montras la influojn de japanaj presaĵoj, fotografado kaj la arto de Edgar Degas, kiun li admiris.

La dua estas *La Pingloj de Belle-Île*

(bildo 5). Tiu vidaĵo estis ofta temo por Russell. Estas tre alta horizonto, kaj la ĉielo estas preskaŭ nevidebla. La kvadrata formato igas la pentraĵon pli nefigura kaj "konstruita", malpli kiel "fenestro al virtuala mondo".

Dum la someroj de 1896 kaj 1897, Russell pentris en Belle-Île kun la juna Henri Matisse, kiu kuraĝigis lin pentri per pli pura paleta.

...

En 1908 Marianna tragike mortis post mallonga malsano (42-jaraĝe). Tio estis severa frapo por Russell. Li vendis Château Goulphar, kaj ekvivis migrade, irante de loko al loko en Eŭropo kaj Britio. Russell reedziĝis en 1912 al usona kantistino (kaj amiko de sia filino), Caroline de Witt Merrill, konita kiel "Felize". Russell kaj lia nova edzino transloĝiĝis al Sidnejo dum la fruaj 1920-aj jaroj, kaj ekloĝis en Watsons Bay en 1924.

Russell mortis en 1930 (71-jaraĝe). Li estis unu el la plej kosmopolitaj artistoj de Aŭstralio, tamen malgraŭ tio, ne bone konata. Li persone observis kaj partoprenis la artmovadojn de impresionismo, punktismo kaj simbolismo ĉe iliaj fontoj, kaj parte absorbis ilin kaj parte reagis kontraŭ ili.

* Interese kaj amuze, Monet parolis pri Russell al siaj amikoj kiel la "usona pentristo".

MC Escher (1898–1972)

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)



MC Escher, 'Mano kun spegulo'

Dum vizito de miaj Nederlandaj Esperanto-amikoj Ton kaj Miny, ni vizitis la Nacian Galerion de Viktorio, en Melburno, por spekti la Escher-ekspozicion. Dum multaj jaroj mi admiris la desegnaĵojn de Escher do estis granda plezuro ke mi havis la ŝancon spekti multajn de liaj artaĵoj.

Maurits Cornelis Escher (1898–1972) estas unu el la plej famaj grafikaj artistoj de la mondo. Lia arto estas admirata de milionoj da homoj tutmonde. Li naskiĝis en Leeuwarden, Nederlando, la kvara kaj plej juna filo en la familio. Post kvin jaroj la familio translokiĝis al Arnhem, kie li pasigis la plejparton de sia junaĝo.

Escher komencis siajn lecionojn pri arkitekturo ĉe la Lernejo de Arkitekturo

kaj Ornamaj Artoj en Haarlem. Jam post unu semajno li informis sian patron, ke li volis forlasi siajn lecionojn pri arkitekturo kaj koncentriĝi pri studado de grafikaj artoj. Li estis subtenata de sia instruisto Samuel Jessurun de Mesquita, al kiu li montris siajn desegnaĵojn. Fininte sian lernadon, li vojaĝis dum longa tempo tra Italujo, kie li renkontis Jetta Umiker kun kiu li edziĝis en 1924. Ili iris al Romo, kie ili loĝis ĝis 1935. Dum tiuj 11 jaroj MC Escher vojaĝis ĉiujare tra Italujo, kie li faris desegnaĵojn kiujn li poste uzis en sia studio por siaj litografioj kaj lignaj gravuraĵoj.

Post kiam Escher forlasis Italion en 1935, lia intereso ŝanĝiĝis de pejzaĝo al io, kion li priskribis kiel "mensaj bildaĵoj", ofte bazitaj sur teoriaj premisoj. Ĉi tio estis instigita parte per dua vizito en 1936 al la palaco de la Alhambra, en Granado, Hispanujo. La prilaborita tegolo garnanta la maŭran arkitekturon sugestis novajn direktojn pri la uzo de koloro kaj la ebenigita aranĝo de interplektitaj formoj. Anstataŭigante la abstraktajn matricojn de maŭraj kaheloj per rekoneblaj figuroj, en la malfruaj 1930aj jaroj Escher disvolvis "la regulan dividon de la ebena." La artisto ankaŭ uzis ĉi tiun koncepton en kreado de siaj presaĵoj de Metamorfozo.

Dum sia vivo, Escher faris 448 litografiojn kaj lignajn gravuraĵojn kaj pli ol 2 000 desegnaĵojn. Ĝuste kiel iuj el liaj famaj antaŭuloj – Michelangelo, Leonardo da Vinci, Dürer kaj Holbein – Escher estis maldekstrulo.

Krom sia laboro kiel grafika artisto, li ilustris librojn, desegnis tapiŝojn kaj banknotojn, poŝtmarkojn, murpentraĵojn ktp.



MC Escher, 'Relativeco'


Dum siaj jaroj en Svislando kaj dum la dua mondmilito, li kun granda energio laboris pri sia ŝatokupo. Li tiam faris 62 el la 137 simetriajn desegnaĵojn kiujn li faris en sia vivo.

Li ludis pri arkitekturo, perspektivo kaj neeblaj spacoj. Lia arto daŭre mirigis kaj mirigas milionojn da homoj tra la mondo. En lia arto ni rekonas lian bonegan observadon de la mondo ĉirkaŭ ni kaj la esprimon de lia propra fantazio. MC Escher montras al ni, ke realeco estas mirinda, komprenebla kaj fascina.


En 1954 ekspozicio de la artaĵoj de Escher koincidis kun la Internacia

Kongreso de Matematikistoj en Amsterdamo kaj estis rigardata de centoj da delegitoj. Ĝi ŝaltis intereson en liaj artaĵoj tra la tutmonda matematika komunumo, inter ili juna brita matematikisto Roger Penrose kaj Kanada geometriisto HS Coxeter. Escher komencis korespondadon kun ambaŭ viroj kiuj provizis al li ideojn pri nova laboro kaj solvojn al problemoj kiujn li mem ne povis solvi.

En la fino de la 1950aj jaroj, Escher kreis siajn plej unike famajn bildojn de ŝajne neeblaj konstruaĵoj, kelkaj el kiuj enkorpigis neeblan objekton sugestita al li de la matematikistoj. Escher volis,



MC Escher, 'Tago kaj Nokto'



ke tiuj desegnoj perpleksigu spektantojn

Serpentoj (Natrikoj) (1969) estas lia lasta ligna gravuraĵo kaj montras senlimajn malgrandajn ringojn kiuj kreskas de la centro de la rondo, atingas maksimuman grandecon, kaj tiam malpligrandiĝas denove kiam ili atingas la eksteran cirkonferencon.

Escher mortis en Hilversum, Nederlando je la 27a de Marto, 1972.

MC Escher, 'Serpentoj' 1969

Eksterlandaj ferioj... en mia domo

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Mi verkas ĉi tiun artikolon en aŭgusto 2021 nur kelkajn tagojn post nova ekapero de kronviruso en Nov-Zelando kaj deviga hejmrestado. Tamen, mi havas etan sekreton – diru nenion – fakte, mi sukcese vojaĝis eksterlanden.

Unue, mi sidis en mia aŭtomobilo kun sekurzono surmetita, kaj mi imagis, ke mi sidas en aviadilo. Poste, mi sidis en nia balkono kaj mi vokis kelnerinon (mian filinon) por peti kapuĉinon. Mi imagis, ke mi sidas en placo en Romo, aŭskultante italan muzikon kaj rigardante preterpasantojn. Poste, mi promenis en nia ĝardeno, imagante ke mi promenas en afrika ĝangalo. Post laciga promeno,

mi kuŝis sur mia lito por legi libron kaj mi imagis, ke mi kuŝas sur sabla plaĝo apud blua maro sur Pacifika insulo. Poste mi iris al la manĝoĉambro kaj bela virino (mia edzino) alportis ege bongustan grekan salaton. Mi imagis, ke mi sidas en restoracio en Ateno. Manĝinte, mi trinkis iom da vino kaj imagis, ke mi estas en vitejo en Kaburbo. Poste mi sidis antaŭ mia komputilo kaj parolis dum virtuala kunveno kun Esperantistoj. Certe tiam mi sentis, ke mi estas en internacia etoso.

Je la fino de la tago, mi enlitiĝis kaj imagis, ke mi dormas en granda aviadilo survoje al internacia feria loko.



Aŭstralia/Nov-Zelanda Hibrida Kongreso kaj Somerkursaro • 7–13 januaro 2022

Esperanto-Domo Sidnejo (143 Lawson St, Redfern NSW, Aŭstralio)
kaj rete, per **Zoom**

Kongresanoj en Sidnejo partoprenos iujn sesiojn ĉeeste, kaj aliajn, kune antaŭ granda ekrano. Ankaŭ okazos kunaj manĝoj kaj ekskurso. Ĉiu ekster-sidneja kongresano devos organizi sian propran tranoktadon. (AEA intencas publikigi liston de rekomendataj lokoj antaŭ Decembro.)

Kiam: vendredon, 7 januaro (vespere)
ĝis merkredo, 12 januaro (vespere)
+ (nur ĉeeste) ĵaŭdon, 13 januaro:
vizito al la Muzeo de Nuntempa Arto
(MCA) kaj Manly (per pramo)

Pri la informo – inkluzive de prezoj:
esperanto.org.au/kongreso



Informo pri fotoj

1 Vessel, Hudson Yards, New York, 2019. Foto: Juliana Malta, per Unsplash
4 Varied sitella (Daphoenositta chrysoptera). Foto: Terry Manley
5 Kep Enderby 1970, Wikipedia
6 Kep Enderby, Australian National Archives
7 Kep Enderby kaj Penny Vos. Foto: Kam Lee
8 Ananasa kuko. Foto: Joanne Johns
10 Charlotte Cooper, per *Hark Around the Greats*
11 Viro kuranta. Foto: Jenny Hill, per Unsplash
11 Ĉasistoj, per Survival Life
11 Golfudanto. Foto: Courtney Cook per Unsplash
12 Balkono kun streperoj. Foto: Heather Heldzingen
13 Pied Currawong (Strepera graculina). Foto: Victor Fazio, per Flickr
14 John Russell. Foto: Barcroft Capel Boake, per Arkivo de Art-Galerio de NSK
15 John Russell, *Kvin etudoj de Vincent van Gogh* (ĉ.1886–88). Kolekto de Art-Galerio de NSK
15 John Peter Russell, *Portreto de Vincent van Gogh* 1886, 60.0 x 45.0 cm, Rijksmuseum

Vincent van Gogh, Amsterdam (Vincent van Gogh Foundation)

16 John Russell, *S-ino Sisley apud la bordo de la rivero Loing ĉe Moret* 1887. Kolekto de Art Galerio de NSK

17 John Russell, *La Pingloj de Belle-Île* ĉ.1890. Kolekto de Art-Galerio de Okcidenta Aŭstralio

18 MC Escher, *Mano kun spegulo* © The M.C. Escher Company B.V.- Baarn – Nederlando, per ArtNews

19 MC Escher, *Relativeco*, de "MC Escher: Realeco kaj Iluzio" © The M.C. Escher Company, Nederlando

20 MC Escher, *Tago kaj Nokto*. © The M.C. Escher Company B.V.- Baarn, Nederlando, per ArtNews

20 MC Escher *Serpentoj* July 1969 kolora ksilografajo, Kolekto Escher, Gemeentemuseum Den Haag, The Hague, Nederlando © The M. C. Escher Company, Nederlando, per Broadsheet

21 Ponto en Romo, Vinberejo apud Kapurbo Fotoj: David Ryan

24 Jonny M kaj kongresanoj ĉe la Trilanda Kongreso, Bandung, 2016. Foto: Kam Lee

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Ivan Pivac | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Bradley McDonald

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

